

**NSiR - Nova Sento in Rete  
N. 1109 (36/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet  
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet  
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,  
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Disvastigu! .....	2
- Agadoj okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj .....	2
- Tago de Veteranoj dum la VK .....	3
- Premio Maŭro La Torre .....	4
- Monataj rendevuoj per zoom .....	5
- Belartaj konkursoj anoncitaj virtuale kaj revue.....	6
- Novaj libroj.....	6
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 1 .....	9
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 2 .....	9

**DISVASTIGU!**



**esperanto**

lingua internazionale parlata in tutto il mondo

logica

di veloce apprendimento

equa

## **Corso online gratuito**

**15 lezioni di 90 minuti**

**Sufficienti per una comunicazione di base**

**Inizio corsi NOVEMBRE**

Per informazioni e orari scrivere a:

**[corsi@esperanto.it](mailto:corsi@esperanto.it)**

Una lezione a settimana, orario e giorni da concordare con il centro unico iscrizioni. Insegnanti su tutto il territorio nazionale

### **AGADOJ OKAZE DE LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ, 26 SEPTEMBRO 2021**

Ekde 2001 la Konsilio de Eŭropo, en kiu membras 47 ŝtatoj kun 800 milionoj da loĝantoj, ĉiujare je la 26-a de septembro okazigas "Eŭropan tagon de lingvoj". La celo estas instigi al malkovro de pliaj lingvoj, ĉar lingva diverseco estas rigardata kiel ilon por atingi pli grandan interkulturan komprenon kaj kiel kernan elementon de la kultura heredaĵo de la kontinento - kialo por subteni la plurlingvecon en la tuta Eŭropo. Ĉi-jare post la pandemia periodo rekomenciĝas

kun prudento eventoj okaze de la Tago de Lingvoj en multaj landoj de la mondo, ne nur en Eŭropo. Informoj en multegaj lingvoj troveblas ĉe <https://edl.ecml.at/>. Se vi estas instruisto tre verŝajne okazos evento ankaŭ en lernejo de via urbo. Se estos ebleco, partoprenu kaj profitu la okazon por prezenti Esperanton kiel lingvon efektive parolatan de vasta komunumo kaj lernata pli kaj pli, kun preskaŭ unu miliono da lernantoj nuntempe en *Duolingo*, kaj tiu estas nur unu el la kursoj retaj kaj ĉeestaj en la mondo. Cetere vi povus disvastigi informon pri la fakto, ke ekzistas multaj proponoj en la civitana konsulto de la eŭropunia "Konferenco pri la estonteco de Eŭropo": pri la rekono kaj la utiligo de Esperanto en Eŭropo.

Detale informas UEA-vikipaĝo [https://uea.org/vikio/Konferenco pri la estonteco de Eŭropo](https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_de_Eŭropo). Ĉi tiu agado estas apogata de la UEA-Komisiono por eŭropa agado kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). En la sama kadro membro de tiu komisiono, Pierre Dieumegard, prezidanto de la franca sekcio de Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE), okupiĝas pri disponigado en Esperanto kaj en aliaj eŭropaj lingvoj de la "Konciza libro pri MIME", kiu estas la rezulto de esploro financita antaŭ pluraj jaroj de la Eŭropa Komisiono kaj kunordigita de Profesoro François Grin pri "Movebleco kaj Inkluziveco en Multlingva Eŭropo", pri kio eblas legi en [mime-project.org](http://mime-project.org). La dokumenta pdf-libro "MIME Vademecum" = "Konciza libro pri MIME" enhavas kelkajn paĝojn pri Esperanto, kaj la tuta enhavo estas interesa rilate al multaj aspektoj de lingvaj politikoj. La projekto estos prezentata franclingve rete je la 26-a de septembro, je la horo 16:00 UTC (18h laŭ Brusela tempo). Aliĝo: <https://e-d-e.org/fr/orga/index.php?article1/premier-article>. Ankaŭ je la 26-a de septembro Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) invitas al anglalingva reta prezento je la horo 17:30 UTC (19h30 laŭ Brusela tempo): European Day of Languages - Language learning in the EU - Conference on the Future of Europe Aliĝo: <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/37/meetings/49871>. La temo estas la propedeŭtika efiko de Esperanto kun prezento de kelkaj argumentoj kaj faktoj ĉi-rilataj. La evento celas atingi homojn ekster Esperantujo, kiuj interesiĝas pri la lingva situacio en Eŭropa Unio.

## **TAGO DE VETERANOJ DUM LA VK**

Okaze de la fermo de la Virtuala Kongresejo, okazis du gravaj programeroj.

Dum la Tago de Veteranoj, Gian Carlo Fighiera estis omaĝata de pluraj konatoj tutmonde, kaj lia granda laboro, kune kun tiu de Ada, aparte reliefigata. Se vi maltrafis ĝin, nepre spektu ĝin ĉe la reta kanalo de UEA en youtube:

<https://www.youtube.com/watch?v=2DRC0jWESso>

Koran dankon Gian Carlo, pro la laboro kiun vi faris kaj pro la ekzemplo kiun vi donas konstante!

Ankaŭ okazis la Premia Festo de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021. Nicola Ruggiero kaj Sara Spanò kontribuis laŭlegante kelkajn verkojn. Sara Spanò gajnis la trian premion ĉe la branĉo "Prozo". Se vi maltrafis ĝin, nepre spektu ĝin ĉe la reta kanalo de UEA en youtube:

<https://www.youtube.com/watch?v=NE1Ye1eh6o4>

Plenaj rezultoj aperas ĉe: <https://uea.org/aktuale/komunikoj/2021/Rezultoj-de-la-Belartaj-Konkursoj-2021>

## PREMIO MAŬRO LA TORRE

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la familio La Torre anoncas konkurson pri esplorkampo en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, Profesoro Mauro La Torre (1946-2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis profesoron Mauro La Torre honora membro de ILEI.

La esplor-kampoj estas:

Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj

Interkultura edukado per Esperanto

Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton

Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto

Retaj kursoj pri Esperanto

Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidatoj anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la 1a de januaro 2022.

La ILEI-estraro kaj la familio La Torre tiam starigos juĝ-komisionon en rilato kun la temo de la esplor-laboro.

La esplor-laboro devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj.

Ĉiuj kandidatoj transdonu siajn laboraĵojn rete al [ilei.prezidanto@gmail.com](mailto:ilei.prezidanto@gmail.com) ĝis la 30a de aprilo 2022 por la okazigo de la konkurso, kaj la prezidanto transdonos ilin al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio.

La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30a de junio 2022. La gajninto devos sendi naŭ paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas al familio La Torre kaj po unu, al diversaj gravaj Eo-bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI "Ni Savu Niajn Semojn".

La premio konsistas el sumo de 500 eŭroj. ILEI retenas al si la rajton eventuale aperigi la gajnintan raporton. La konkurso La Torre okazis jam du fojojn, en 2015 kaj en 2018. La trian fojon, la premio kaj la diplomo estos transdonitaj en la jaro 2022 okaze de la 55a ILEI-Kongreso en Kebekurbo kaj pli vaste prezentata en la 107a Universala Kongreso de UEA en Montrealo.

Ahmad Reza Mamduhi

prezidanto de ILEI

Leggete anche questa intervista:

<http://esperanto.cri.cn/e-club/enjoyreading/4204/20210928/704814.html>

## MONATAJ RENDEVUOJ PER ZOOM

Itala Esperanto-Federacio rekomencas sian agadon, post la somera kongresa periodo. Unu el la plej sukcesaj agadoj dum la unua duono de la jaro estis la monataj rendezuoj en ZOOM por pritrakti plej diversajn temojn.

Kaj ĝuste de tio ni rekomencas. Ni invitas vin ĉiujn mardon la 12an de oktobro je la 21.00 itala horo, (19h00 UTC), partopreni la esperantlingvan vesperon dum kiu Marc Giraud de la pariza grupo, Detlef Haussmer de la grupo de Darmstadt, Debora Rossetti, Roma grupo, Luigi Fraccaroli, Breŝa grupo, debatos pri la temo "Kion signifas ĝemeliĝo por la verda popolo?"

La elekto ŝuldiĝas al la fakto ke la ontjara kongreso, Breŝo aŭguste 2022, pritraktos parenkan temon kaj IEF intencas inviti la italajn esperantistojn aktive enketi pri propraj ĝemelurboj, serĉi esperantistajn kontaktojn ktp ktp

Kion signifas ĝemeliĝo por la verda popolo?

Ora: 12 ott 2021 21:00 Roma Entra nella riunione in Zoom <https://us02web.zoom.us/j/84465800827?pwd=RERicjhDUmNqTW03ZTloL3QvVENLZz09> ID riunione: 844 6580 0827 Passcode: 943302

## BELARTAJ KONKURSOJ ANONCITAJ VIRTUALE KAJ REVUE


La 19-an de septembro la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK) diskonigis la rezultojn de la 72-a okazigo en premifesto elsendita pere de la kanalo de UEA ĉe YouTube, UEAviva. La BK-feston kungvidis Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) kaj Miguel Fernández, respektive Sekretario kaj Prezidanto de la Belartaj Konkursoj. En la BK partoprenis absolute rekorda nombro de **186 verkoj** el la 5 kontinentoj.


Miguel Fernández anoncis la aperon de la libro *Ĉiuj steloj etas nokte* ([katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9877](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9877)), antologio de mikronoveloj partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj. Krome li deklamis la poemon *Soneto de la Lumturo*, de Suso Moinhos, el la libro *Laminarioj*. La poemon *Fratinoj*, de Kris Williams (Ungar) deklamis Sara Spanò. La BK-feston ornamis 3 kantoj: *Ekas la nokto*, kies teksto ricevis la unuan premion en la branĉo Kantoteksto, kaj estis muzikigita de Liven Dek kaj orkestrita de Antero Ávila; *Bela rev'*, kies teksto ricevis honoran mencion en la branĉo Kantoteksto kaj estis muzikigita de Kajto; kaj *Venu al la kisoj*, de Miguel Fernández kaj Viktoro Solé. La videon fermis fota prezento de pluraj el la aŭtoroj de la mikronoveloj konsistigantaj la kolekton *Ĉiuj steloj etas nokte*.

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021 re-spekteblas en UEAviva: [youtu.be/NE1Ye1eh6o4](https://youtu.be/NE1Ye1eh6o4).

Plenaj rezultoj aperis en la oktobra numero de revuo *Esperanto*, sur p. 209 kun alvoko por BK 2022 sur p. 208. Pliaj raportoj aperis en 'La Kolombo de Paco', numero 22, por ke ankaŭ nemembroj de UEA ricevu la rezultojn. Bildo en la PDF.

## NOVAJ LIBROJ

	<p>POESIA DA TUTTI I CIELI 2021 red. G. Campolo Raccolta di poesie, in italiano ed esperanto, del 6° concorso omonimo. ISBN 979-12-80169-16-7 Editoriale Lombarda, Como 2021</p> <p>21 cm.,      277 p.      € 18,00</p>
---	--



## UNU LINGVO POR ĈIUJ, UNU LINGVO DE NENIU LANDO


I. Caligaris

Tesi sugli esperantisti, pubblicata nel 2016, ora tradotta in esperanto.

ISBN 978-88-548-8864-7

Edistudio, Pisa 2021

21 cm., 424 p. € 19,50



## VENECIO KAJ EŬROPO

M. Zanetto


Trad. P. Tosato

Collezione di conferenze tenute sulla storia di Venezia

ISBN 979-85468-162-78

Wrocław, Polonia 2021

22 cm., 123 p. € 20,00



## VERDA STELO KAJ ROZA TRIANGULO

G. Silfer

Antologia di brani di prosa e poesia completata da alcuni saggi sugli autori presentati.

ISBN 3-906595-26-9

LF-Koop., La Chaux-de-Fonds 2021

21 cm., 111 p. € 15,00



**LA DIA KOMEDIO RAKONTATA AL LA INFANOJ**

A. Piccione

Trad. C. Minnaja


Illustrazioni di F. Rovira

Il famoso poema semplificato e illustrato spiegato ai ragazzi.

ISBN 978-88-96582-26-8

F.E.I., Milano 2021

22 cm., 190 p. € 27,00



**TACCUINO NOTTURNO DELLA GUERRA CROATA**

S. Štimec

trad. F. Paccagnella

Testimonianza personale della guerra croata e bosniaca.

ISBN 978-88-7036-816-1

Edistudio, Pisa 2021

21 cm., 96 p. € 15,00



**HOMARANISMO** *Un credo "neutrale-umano" per il mondo*

D. Astori trad. C. Minnaja

Uno studio sul desiderio di Zamenhof di giungere ad un unico credo che unisca i valori comuni di tutti gli uomini.

ISBN 9788863190021

UNI.NOVA, Parma 2021

21 cm., 56 p. € 12,00



## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON 1

La Confederazione Elvetica ha quattro lingue ufficiali: italiano, francese, ladino e tedesco. Non l'inglese. Questo forse ha un po' confuso i gestori del sito svizzero di una nota catena scandinava di mobili, quando hanno compilato la parte relativa alla registrazione di potenziali clienti...

Please enter your via e numero civico

## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON 2

Per favore, qualcuno mi dica di cosa si tratta, perché lui è astuto, io no.

Prezzo IVA inclusa

€ 0,21 - 1,21 ~~€ 0,34 - 1,95~~ -38%



397

Dropshipping astuto dei pedometri di Sport della cinghia della sostituzione M6 del Monitor di pressione sanguigna di frequenza cardiaca del braccialetto della sostituzione dell'orologio M6